

IFEF- historio

suplemento 1999 - 2019



2020

Enkondukaj vortoj

Okaze de la 110-jariĝo de Esperanto-aktiveco inter fervojistoj IFEF kolektis informojn por kompletigi la historion, pri kio eldoniĝis jam antaŭe du kajeroj: 'Historio 1909-1984' (1984) kaj 'Kompletiga Suplemento 1984-1999' (1999). La nova kajero temas pri la periodo 1999-2019.

Kvankam je unua vido aspektas, kvazaŭ preskaŭ ĉio en tiu periodo estas 'mal-' ... malkresko, malmultnombreco k.s., estas kaŭzo memori la multajn bonajn aferojn, kiujn faris la membroj kaj la landaj asocioj. Internacia organo kun multaj fakaj artikoloj, landaj jarkunvenoj, ĉiujaraj kongresoj, eĉ dufoje ekster Eŭropo, staĝoj naciaj kaj internaciaj, faka kunlaboro kun UIC, fervojistaj kontaktkunvenoj dum UK-oj ... en la kajero oni povas legi pri ĉiuj tiuj aktivecoj.

Fakdelegitoj pri fervojo ĉe UEA multnombras, kaj la IFEF-anoj, kiuj listiĝas tie, daŭre estas pretaj respondi al demandoj kaj trovi informojn. Entute IFEF estas tre aktiva faka asocio de UEA.

Ni deziras al vi bonan legadon kaj gratulas al la fervojista Esperanto-movado.

IFEF



Mallongigoj uzitaj

AIS	Akademio Internacia de la Sciencoj
DLF	Dopolavoro Ferroviario, fervojlibertempa societo itala
ĈEA	Ĉeĥa Esperanto-Asocio
ĈEL	Ĉina Esperanto-Ligo
FISAIC	Internacia organizo de fervojlibertempaj kulturaj kaj artaj disciplinoj
IFEF	Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
IFES	Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno
IFK	Internacia Fervojista Kongreso
IKEF	Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
ISAE	Internacia Scienca Asocio Esperantista
KAEST	Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko
TAKE	Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
VIFES	Vintra Internacia Fervojista Esperanto-Semajno
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UFE	Unuiĝo Franca por Esperanto
UIC	Internacia Unuiĝo de Fervojoj
UK	Universala Kongreso
UMEA	Universala Medicina Esperanto-Asocio
ZEO	Zamenhof/Esperanto-Objekto
Ĉk	Ĉefkomitatano (de IFEF)
Pr-ino	Prezidantino (de IFEF)
Vpr-ino	Vicprezidantino (de IFEF)
Sk	Sekretario (de IFEF)

Internacia Movado

Periodo 1999-2019

1999

La 51-a IFK okazis en *Le Mans*, Francio, kun alloga post-kongreso en Normandio. Jam post la 1998-a, jubilea kongreso kaj precipe post Novjaro 1998-1999 la varbado, informado kaj reklamado estis masiva. 277 personoj el 21 landoj partoprenis la kongreson.

IF raportis pri multaj bonsukcesaj landaj jarkunvenoj kun partopreno ne nur de la membroj, sed ankaŭ de eksterlandaj gastoj. Cetere okazis 'Nordia Kunveno' tradicia jam kelkfoje kun partopreno de IFEF-membroj de Finnlando, Svedio, Norvegio kaj Danio.

Pro tiuj supraj informoj la resuma jarraporto pri la stato de la landaj asocioj estis optimisma. Estis multaj aktivecoj kaj multaj aktivaj membroj, kiuj kunhelpis.

En Ĉinio kaj cetera Azio estis granda aktiveco, ankaŭ pri la eventuala aliĝo al IFEF.



Dum la UK en Berlino, Germanio, kunvenis 77 fervojistoj el 17 landoj. Joachim Gießner aranĝis la kunvenon, kiu ofertis interesan prelegon kaj poste ekskurson al Lehrter Bahnhof.

Dum la kongreso de IFEF eldoniĝis la Kompletiga Suplemento 1984-1999 al la historio de IFEF kaj fervojista Esperanto-movado.

UEA eldonis gvidilon por 'fakvortaristoj kaj terminokreantoj', kaj ĝi ne estis surpriza por la fakgrupo de IFEF, kiu multjare serioze kaj sistematike laboras pri la afero.

2000

La 41-a IFES okazis en *Saint-François-Longchamp*, Francio, kun partoprenantoj el ses landoj – Belgio, Ĉeĥio, Danio, Francio, Hungario kaj Kubo; bona ski-vetero kaj kutimaj programeroj certigis la sukcesan vintran ferion por la 22 partoprenantoj.

En Vieno, kadre de la ĝeneralkunveno de FISAIC, la prezidanto de IFEF, Joachim Gießner, ricevis la distingon 'Honora Titolo' pro 'sia konstanta agado ene de FISAIC kaj ĉefe por la disvolviĝo de la rilatoj inter FISAIC kaj diversaj orientaj landoj en Eŭropo'.

La 52-a IFK okazis en Budapeŝto, Hungario. Por la kvara fojo Hungario gastigis kongresanojn, ... ĉifoje 277 el 25 landoj. La slogano de la kongreso estis 'Eŭropo bezonas fervojon', kaj sub tio okazis la kutimaj programeroj, organizaj, fakaj kaj turismaj. Ĉiuj ĝuis la someran veteron kaj la bonan organizadon. Ĉeestis kaj partoprenis la komitatlaboron 19 komitatanoj.

Dum la Universala Kongreso en Tel-Avivo, Israelo, okazis fervojista kontaktkunveno kun 21 partoprenantoj el 11 landoj.

Novembre okazis en Prago la KAEST 2000 kun tri programoj-loj:

- A: Ekonomio sojle de la tria jarmilo
- B: Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto
- C: Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko ĝenerale

Germano Gimelli, Italio, mortis la 12-an de novembro 1999. Laŭ la nekrologo de R. Bolognesi: 'Li partoprenis centojn da kongresoj kaj manifestaciojn en Italio kaj en la tuta Eŭropo (UEA, IFEF, FEI, UECI ktp.), en kiuj ofte li aktive kontribuis, ankaŭ kun siaj filatelaj kolektoj kun temoj Esperanto-Fervojo.



2001

Komence de la jaro okazis en Tatranská Lomnica, La Altaj Tatroj, Slovakio, la 42-a IFES kun 18 partoprenantoj de ses landoj. La riĉa programo (krom skiado) plezurigis la ĉeestantojn.

La 53-a IFK okazis en Tábor, Ĉeĥio, kun 194 partoprenantoj el 18 landoj (el tiuj 18 komitatanoj). La postkongreso gvidis al tri banejoj urboj de Ĉeĥio: *Karlovy Vary*, *Mariánské Lázně* kaj *Františkovy Lázně*.



La Universala Kongreso okazis en Zagrebo, Kroatio, kaj dume okazis la kutima fervojista kontaktkunveno kun ĉ. 50 partoprenantoj. Post la kunveno okazis ekskurso al Fabriko de fervojaj veturiloj "Gredelj" en Zagreb.

2002

Precipe per francaj laborfortoj IFEF dum tiu jaro vere eniris la 21-an jarcenton per funkciigo de la unua retpaĝaro, kiu ekde tiam multe disvolviĝis kaj ŝanĝiĝis.

En Rumanio okazis la 43-a IFES en Predeal meze de februaro. Bedaŭrinde malaperis la neĝo tuj antaŭ la aranĝo, sed la abunda programo certigis, ke la partoprenantoj vidis belajn lokojn kaj ĝuis la kunestadon. La respondeculo pri skisemajnoj Hubert Peyrouly disdonis plurajn premiojn.

La 54-a IFK okazis en Plovdiv, Bulgario, kun 203 partoprenantoj kaj 17 komitatanoj. Dum tiuj jaroj la faka laboro de IFEF pli kaj pli 'eniris la kongresprogramon'. Terminologiaj diskutoj kaj fakaj prelegoj estis kaj estas ankoraŭ kutimaj kaj fiksitaj eroj de kongreso.



La postkongreso gvidis al la ĉenigramara turisma urbo Nessebar. La jam kutima KAEST dum paraj jaroj okazis en Dobřichovice kun jenaj temoj:

- A: Elektronikaj rimedoj
- B: Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto
- C: Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko ĝenerale

En IF.5 estis publikigita la laborplano de IFEF por la periodo 2002-2010.

Dum la UK en Fortalezo, Brazilo, okazis fervojista kontaktkun-veno kun 16 fervojistoj el sep landoj. Pro manko de brazila fervojo ne okazis ekskurso post la kunveno.

25/3-2002 forpasis Jaromír Babička Ĉeĥio, - honora membro de IFEF.

2003

La 44-a IFES okazis komence de januaro en *Kunčice pod Ondřejníkem*, fervojista ripozloko, en Ĉeĥio. La ĉeĥa reprezentanto ĉe FISAIC, s-ino A. Abelovská, ĉeestis la aranĝon dum la unua vespero kaj transdonis salutojn de FISAIC, sub kies aŭspicio la aranĝo okazis.

La 55-a IFK okazis en Dresdeno, Germanio, kun 254 partoprenantoj el 19 landoj. 19 komitatanoj ĉeestis la kunven-laboron.

Rodica Todor (RO) estis elektita anstataŭanto de Ĉk.

Pro la retiriĝo de s-ro Sorin Porupca de la Koresponda Servo de IFEF, la Ĝenerala Asembleo aprobis la anstataŭigon per s-ro Dan Dragoş Aldea (RO).

Estis riĉa programo kun multaj interesaj eroj, kaj cetere Dresdeno estas granda, interesa urbo. Multaj kaptis la okazon dum 'liberaj horoj' iom turismi en la urbo. Okazis i.a. arta kantvespero, dum kiu estis prezentitaj famaj kantoj el operoj kaj operetoj en Esperanto, kvar kantistoj (du viroj kaj du virinoj) prezentis 15 famajn kantojn, majstre tradukitajn de Joachim Gießner.

La Komitato de la Universala Esperanto-Asocio en sia kunveno en Göteborg kadre de la 88-a UK elektis d-ron Imre Ferenczy, nian hungaran kolegon, Honora Membro de UEA.

La 7-an de aŭgusto mortis Henning Hauge, Danio, dum tragika trafikakcidento, nur 68-jaraĝa. Li havis multajn postenojn gvidajn ĉe DEFA kaj estis kasisto de IFEF. Li estis dum jaroj dana reprezentanto ĉe FISAIC.



En novembro forpasis Joachim Gießner post longa kaj tre aktiva vivo. Liaj kapabloj, lia nelacigeblo kaj liaj multaj meritoj estas malfacile priskribeblaj. En IF.4/2001 Rolf Terjung en sia nekrologo priskribas la Honoran Prezidanton kaj grandan laborforton, kiu mortis monaton antaŭ sia 90-jariĝo. En IF.2/2004 oni povas relegi la funebran paroladon de R. Bolognesi dum la entombiga ceremonio. Por FISAIC liaj kono de Esperanto kaj kontaktoj kun mez- kaj orienteŭropaj landoj grave helpis al pluraj iliaj aliĝoj al la organizaĵo.

2004

Okazis la 45-a IFES en Francio, en restadejo de Turisma Asocio de Fervojistoj en *Argentière*. 46 partoprenantoj el Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Danio, Francio, Germanio, Hungario, Rumanio kaj Svisio ĝuis la aranĝon, la sunon kaj la neĝon.

La 56-a IFK okazis komence de majo en *Sopron*, Hungario. 207 personoj el 23 landoj aliĝis kaj venis, 16 el ili estis komitatanoj. La ĝenerala sekretario de FISAIC, Georges Wallerand, ĉeestis kaj salutis la kongreson.



Dum la 89-a UK en *Beijing*, Ĉinio, okazis renkontiĝoj, kunvenoj kaj kunestadoj inter membroj de la ĉina fervojista Esperanto-organizo kaj ĉeestantaj IFEF-anoj, kaj establiĝis la kontakto, kiu poste donis du kongresojn de IFEF en Ĉinio kaj multajn prelegojn kaj fakajn artikolojn.

Kelkaj IFEF-anoj vizitis la grandan transport-foiron INNOTRANS en Berlino, Germanio, kie pli ol mil entreprenoj montris siajn produktojn.

KAEST 2004 okazis en *Dobřichovice* (CZ) kun 40 partoprenantoj kaj kun jenaj temoj:

- A: Fake pri Esperanto
- B: Esperante pri sciencoj

Wim van Leeuwen, Nederlando, forpasis en julio. Li multe laboris kaj nacie kaj internacie ... pri instruado, pri terminologio kaj organize. Li estis vicprezidanto de IFEF, honora membro de IFEF kaj ricevis la oran medalon de FISAIC.

2005

La 46-a IFES okazis en hispana *La Molina* (Katalunaj Pireneoj) kun 42 partoprenantoj de Francio, Germanio, Danio, Belgio Rumanio, Hungario kaj Hispanio (Katalunio).

En IF.2 la respondeculo pri skisemajnoj Hubert Peyrouy vokis anstataŭanton al la laboro.

En IF.3 oni povis legi: *Per la helpo de nia ĉefkomitatano Jindřich Tomášek la pola fervojista asocio revigliĝis pro la sindonemo de siaj membroj. Gratulojn al ili.* Post tiam la pola landa asocio aktivas.



Ĉiu landa grupo plantis sian rozon dum la kongreso

Komence de majo okazis la 57-a IFK *Braşov*, Rumanio, kun 274 partoprenantoj el 22 landoj kaj 17 komitatanoj. Oni organize kaj fake laboris, kulturis, turismis, plantis rozojn kaj ĝuis la kunestadon kun amikoj kaj kolegoj. La fakekskurso okazis en Sibiu, al Fervojmuzeo, la dua en Eŭropo post Mulhouse.

2006

Komence de februaro okazis la 47-a IFES en *Bansko*, Bulgario, kun 30 partoprenantoj, el tiuj kvin eksterlandanoj. 'La junuloj', kiuj antaŭ preskaŭ 50 jaroj iniciatis la skisemajnojn, maljuniĝis, kaj la programo kaj la aktivecoj dum la semajno ŝanĝiĝis. Sed amuza estis la semajno, kaj gaja estis la etoso.

Jam en 1988 IFEF akceptis la aliĝon de la ĉinaj grupoj kiel nova landa asocio, kaj nun, por la unua fojo, IFEF kongresis ekster Eŭropo, ĉar la 58-a IFK okazis en *Shanghai*, Ĉinio, kun 224 partoprenantoj el 18 landoj kaj 14 komitatanoj el 12 landoj.



Kongresa kunestado

Estis granda mejloŝtono por IFEF kaj ege granda travivaĵo por tiuj, kiuj partoprenis. En IF.3-4 oni poste povis legi i.a.: *La amikaj akceptoj, la bona disvolviĝo de la kongreso, la amikeca etoso plenigis la koron de ĉiu partopreninto. Plie, la sukcesplenaj laboroj, la ekskursoj, la fakaj prelegoj, la kulturaj kaj distraj eventoj, la bona organizo de la tutsemajna evento faris kongreson neforgesebla kap-plene je memoraĵoj, je amikaj rilatoj. Dankon al niaj ĉinaj amikoj, kiuj efike prizorgis la eventon.*

Dum la 91-a UK en Florenco, Italio, okazis fervojista kon-taktkunveno kun 40 partoprenantoj el 15 landoj. Krome okazis ekskurso al montara pitoreska urbo *Marradi*.

KAEST 2006 okazis en *Dobřichovice* (CZ) kun jenaj temoj:

- A: Lingvo kaj interreto
- B: Studoj el diversaj fakoj

2007



La 48-a IFES okazis en *Azuga*, *Rumanio*, kun 23 partoprenantoj el kvin landoj. Kiel dum antaŭaj jaroj oni diskutis: ĉu IFES povos daŭri, ĉu ĝi restos en la origina formo? En *Azuga* tio estis bone solvita, ne nur en sporta senco.

Francio por la kvina fojo aranĝis kongreson de IFEF ... la 59-a IFK okazis en *Parizo* kun 271 partoprenantoj el 24 landoj, - kaj kun 16 komitatanoj el 14 landoj.

2008

La 49-a IFES okazis en *Braşov*, Rumanio, fine de februaro. Partoprenis 28 personoj el kvar landoj - Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario, Rumanio. Rumanio organizis por la kvara fojo. Post diskutoj oni ŝanĝis la nomon al VIFES (Vintra Internacia Fervojista Esperanto-Semajno).

La jubilea, la 60-a IFK okazis en *Poznań*, Pollando, kun partopreno de 169 personoj el 17 landoj. Kiel kutime ĉefa fakprelego kaj aldonaj, malpli longaj prelegetoj prezentitaj de diversaj landoj estis grava parto de la kongresa programo. Okaze de la kongreso estis inaŭgurita dum postkongreso en *Malbork* ZEO, jam la 35-a en Malbork, sed la unua sub la aŭspicio de IFEF.

La ĉefkomitatano nelacigeble klopodis peri kontakton kun kolegoj en landoj, kie ne plu ekzistas landa asocio de IFEF.

Nova Esperanto-muzeo en *Svitavy*, Ĉeĥio, ekfunkciis.

Kelkaj FISAIC-dokumentoj – precipe protokoloj de diversaj kunsidoj – estu estonte tradukitaj de la landaj asocioj de IFEF en naciajn lingvojn por helpi al la landaj asocioj de FISAIC.

Fervoja Koresponda Servo estis ĉesigita pro tro malgranda deziro uzi la servon.

Dum UK en Roterdamo okazis fervojista kontaktkunveno kun 50 personoj el 12 landoj.



2009

La 50-a IFES / 1-a VIFES okazis en *Braşov*, Rumanio - 90 perso-noj partoprenis, sed ne multaj ekster Rumanio, Peter Kühnel el Berlino gvidis kurson.

La 61-a IFK okazis en *Trieste*: por la unua fojo ne-fervojista klubo kun-organizis la kongreson. Ĉeestis 204 kongresanoj el 19 landoj.



Kiel novaĵo UIC prezentis sian fak-leksikonon RailLexic en USB-memorilo.

Estis farita enketo inter 'la junuloj' pri la estonteco de IFEF – membronombro malkreskas, kongresanoj malpli multnombros ... oni devas nove pensi.

Dum la Universala Kongreso en *Białystok*, Pollando, okazis fervojista kontaktkunveno kun partopreno de 48 personoj el 14 landoj.

La 9-an de oktobro 2009 okazis en la Esperanta muzeo *Svitavy*, malfermo de ekspozicio dediĉita al 'la centjariĝo de fervojista esperanta movado'.

2010

Por la kvara fojo IFEF kongresis en Bulgario, ĉijare en la ĉefurbo Sofio. 136 kongresanoj el 18 landoj partoprenis. La 16 komitatanoj venis de 15 landoj.

La ĉefa fakprelega temo estis: 'Rekonstruo kaj modernigo de fervojlinio *Plovdiv-Svilengrad* ĉe turka-greka landlimo', kaj estis naŭ ceteraj prelegetoj.

Okazis estrarelekto kun kelkaj novaj vizaĝoj: Pr-ino Rodica Todor, Vpr-ino Sylviane Lafargue, Sk. Vito Tornillo, Ks Laurent Vignaud, Rd. István Gulyás. La redaktora laboro estis iomete reorganizita kun redaktora komisiono. Rodica Giuhat (RO) iĝis anstataŭanto de Ĉk.



En IF.4-5 estis publikigita (p. 73) statistiko pri IFEF-membro-nombro 2000-2009.

2011



La 63-a IFK okazis en *Liberec*, Ĉeĥio, kun 173 kongresanoj el 18 landoj. La prezidanto de FISAIC ĉeestis la tutan aranĝon.

La ĉefa fakprelego estis prezentita de Ĉeĥio, kaj estis kvar ceteraj prelegoj. Faka ekskurso gvidis al *Ještěd*, la sola telfero en Ĉeĥio.

Dum la UK en Kopenhago okazis fervojista kontaktkunveno kun partopreno de 23 personoj el 12 landoj, kaj dum posta ekskurso 25 personoj vizitis la kopenhagan metroon kaj la firmaon *MetroService*.

2012

Por la sesa fojo Germanio organizis IFK-on. La 64-a kongreso de IFEF okazis en *Herzberg am Harz / La Esperanto-Urbo*, Germa-nio. Ĉ. 160 personoj el 18 landoj partoprenis. ICH (Interkultura Centro Herzberg) kunorganizis la kongreson kune kun GEFA. Krom la ĉefa fakprelego estis prezentitaj 8 aliaj prelegetoj. Dum la kongreso inaŭguriĝis *Esperanto-Platz* tuj ĉe la stacidomo de Herzberg.



La IFEF-laborplano por la jaroj 2011-2014, en kiu la estraro kaj la komitato de IFEF decidis pri konkretaj farendaĵoj laŭ la strategia laborplano de UEA, prezentiĝis.

Formala kontrakto inter ILEI kaj IFEF estis subskribita, kaj dum la kongreso okazis lingvo-seminario sub gvido de Stefan MacGill, ILEI.

Florin Negrea (RO) iĝis anstataŭanto de Ĉk. Dum la Universala Kongreso en Hanojo, Vjetnamio, okazis fervojista kontaktkunveno kun partopreno de 14 personoj.

2013

La 65-a IFK okazis en *Artigues-près-Bordeaux*, samtempe kaj kunorganize kun la UFE-kongreso: ĉeestis 129 IFEF- kaj 131 UFE-kongresanoj el entute 17 landoj. La komitatanoj reprezentis 12 landojn. Temo de la kongreso estis ‘Rolo de la fervojoj en la disvolviĝo de la moderna mondo’.

Okazis estrarbalotoj: Pr-ino Rodica Todor, Vpr-ino Sylviane Lafargue, Sk. Vito Tornillo, Ks Laurent Vignaud, Rd. István Gulyás.



La ĉefa fakprelego temis pri la bordoza tramo, kaj cetere estis sep longaj kaj malpli longaj prelegoj, krom fakekskurso al tramvoja garaĝo.

Dum la UK en *Reykjavík*, Islando, okazis fervojista kontaktkunveno. Partoprenis 15 personoj el ok landoj.

Pierre Robiolle, Francio, honora prezidanto de FFEA, estis nomumita Kavaliro de la Honora Legio.

La IFEF-retejo pli kaj pli ampleksiĝas, kaj estas skanitaj malnovaj numeroj de IF kaj ties ‘antaŭuloj’, ekz-e ‘Fervoja Esperantisto’: tiuj bultenoj kaj aliaj dokumentoj estis metitaj en la retpaĝaron alireblaj por ĉiuj.

2014

Por la sesa fojo IFEF kongresis en Italio. La 66-a IFK okazis kun 139 partoprenantoj el 19 landoj en *San Benedetto del Tronto* – ĉeestis komitatanoj el 15 landoj.

La ĉefan fakprelegon kiel kutime prezentis la gastiganta lando. – La plej grava novaĵo faka estis, ke ekde tiam UIC prizorgas retan aliron al RailLexic – grava afero por tiuj, kiuj terminologie kaj fake aplike laboras.

La kongreso estis granda je organiza nivelo, ĉar okazis gravaj ŝanĝoj:

- Kongresproponoj pri ŝanĝoj en la membropostulo por komitatano kaj en redukto de estraranoj, pro la malkresko de membronombro, estis akceptitaj
- Strategia laborplano de IFEF estis detale priskribita
- Enkondukiĝis laborgrupoj (vidu la foton sube) pri
 - Statuto
 - Instruado
 - Eksteraj rilatoj
 - Interne de IFEF
 - Historio kaj arkivo
 - Modernigo de informado
 - Financado de projektoj



2015

Printempa estrarkunsido en *Dijon* pritraktis ŝanĝojn en Statuto kaj Regularoj, pri kiuj poste okazis reta balotado.

Jam por la dua fojo la IFK okazis en Ĉinio, en la urbo *Kunming*, samtempe kaj kunorganize kun la 11-a Ĉina Kongreso de Esperanto.

Por ke la komitato estu decidopova, okazis en *Kunming* nova baloto.

La ŝanĝoj ricevis plimulton de la voĉoj, tiel ke la nova IFEF-Statuto estis voĉdonita.



Kontrakto estis subskribita inter IFEF kaj UMEA pri kunlabora interkonsento.

Dum la UK en *Lille*, Francio, okazis fervojista kontaktkunveno. S-ro Jean Ripoche prelegis pri la historio de la Submanika Tunelo; ĉeestis pli ol 50 personoj.

La faka vizito en la trafika regadcentrejo de stacio *Lille-Flandres* kunigis 35 kongresanojn.

Estis subskribita kontrakto pri kunlabora interkonsento inter IFEF kaj ISAE (prez. Antonio Vergara).

2016

La 68-a IFK okazis en *Varna*, Bulgario, la 12 komitatanoj venis el naŭ landoj. Ĉeestis 90 partoprenantoj el 12 landoj.

UIC donis al IFEF 10 senpagajn alirojn al la interret-versio de RailLexic. Tio donis pli facilan aliron al la leksikono por tiuj, kiuj deziras verki fake.

IFEF aliĝis, kun granda helpo de la germana FISAIC-representanto, al FISAIC, kun samaj rajtoj kiel landa asocio.



En UK en Nitro, Slovakio, okazis fervojista kontaktkunveno kun partopreno de 40 personoj. Estis prezentitaj tri fakaj prelegoj.

Dum la Solena Fermo de la 101-a UK oni anoncis la nomojn de 14 espe-ran-tistoj, kiujn la Estraro de UEA honorigis per Diplomo pri Elstara Agado aŭ per Diplomo pri Elstara Arta Agado. Inter ili estas nia membro Leo-pold Patek (Aŭstrio) pro longtempa gvida rolo en la aŭstria movado kaj 25-jara ĉefdelegiteco de UEA.

2017

La 69-a kongreso de IFEF okazis en franca urbo *Colmar*, Francio, kun partopreno de 15 komitatanoj el 12 landoj. Partoprenantoj nombris 170 el 21 landoj.

Kunlaboris en organizado pluraj asocioj: IFEF, FFEA, Espéranto France-Est kaj TAKE.

Estis eldonita speciala numero de TAKE-Kajero pri la konstruado de fervojaj stacidomoj.

Faka ekskurso okazis en *Mulhouse*, oni vizitis la fervojmuzeon, kiu estas la plej granda en Eŭropo.

Francaj fervojistoj (Jean Ripoché) tradukis la gvidilon pri la muzeo Esperanten.



Manlibro pri kolektado, konservado, arkivado, estis disponebla en la retpaĝaro de IFEF kaj papere havebla laŭ mendo.

Nova kunlabora interkonsento kun ILEI (prez. Mireille Grosjean) estis subskribita (ĉefe pri la instruado fare de ILEI-instruistoj kadre de E-kursoj dum IFEF-kongresoj).

IFEF kaptis la ŝancon sin prezenti kadre de la Movada Foiro de la 102-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en la sudkorea ĉefurbo Seulo.

2018

Jubilea, la 70-a IFK okazis en varma Vroclavo, Pollando, kun 14 komitatanoj el 11 landoj.

Ĉeestis 124 kongresanoj el 20 landoj.



Estis subskribita kontrakto pri interkonsenta kunlaboro inter IFEF kaj IKEF (prez. Chielismo Wang Tianyi).

IFEF partoprenis kun informbudo la FISAIC-festivalon multaktivecan en *Wels*, Aŭstrio. Estis disdonitaj faldfolioj pri IFEF en la angla, germana kaj en Esperanto. Partoprenis en la festivalo jenaj aktivecoj de FISAIC (krom Esperanto): muziko, ĥoro, folkloro, radioamatoroj, poŝtmarkkolektantoj, filmo/video, fotistoj, pentristoj kaj modelfervojistoj. Unika ebleco por nin prezenti al kolegoj. Ĉeestis pli ol mil personoj.

La UK kun partopreno ankaŭ de fervojistoj okazis en Lisbono, Portugalio. La fervojista kontaktkunveno kunigis pli ol 50 perso-nojn. Estis prezentita prelego "Ironlev - sistemo de magneta ŝvebigo". Prino R. Todor kaj Carlos Spinola prezentis la sekvont-jaran IFK-on, kiu okazu kune kun HEFA- kaj Andaluza-Kongresoj en Malago, Hispanio. Informiloj kaj aliĝiloj estis disdonitaj al interesatoj.

Fine de la jaro forpasis la sekretario de TS, Heinz Hoffmann, kiu dum multegaj jaroj faris grandegan laboron, kaj la perdo de li lasis preskaŭ ne-anstataŭigeblan lokon. Tamen, kiel ĉiam, IFEF kaj FK denove trovis sian ekvilibron kaj labormanieron por daŭrigi la gravan laboron.

2019

La 71-a IFK okazis en *Málaga*, Hispanio, kunlabore kun kaj samtempe kun la 21-a andaluzia kaj 78-a hispana kongresoj. La plenkunsidon partoprenis 12 komitatanoj el naŭ landoj. La komitato elektis estraron por la venonta trijara periodo.



Krom la kongresan laboron la estraro en *Pardubice* aranĝis seminarion kun la titolo 'Eŭropaj fervojoj', kaj prelegis IFEF-anoj de Rumanio, Italio, Germanio, Ĉeĥio kaj Danio. Tradukis la prelegojn ĉeĥaj IFEF-anoj.

IFEF subskribis kontrakton kun la Trafika Universitato en *Pardubice*, Ĉeĥio, pri reciproka uzado de Esperanto kiel pontlingvo en prezentado de prelegoj k.s.

Dum aŭtuna estrarkunsido en *Poznań* okazis kunvenoj kun gvidantaro de Teknika Universitato en *Poznań* kaj Federacio de Sciencaj kaj Teknikaj Asocioj cele ekkomenci reciprokajn kunlaboron. Eble jam dum la 72-a IFK en 2020 ni rikoltos la unuajn fruktojn de tiu kunlaboro.

Funkciuloj de la Fervojista Movado

Ĉiuj estraranoj de 2000 ĝis 2019

De jaro	Ĝis jaro	Elektita en IFK	Nomo	Lando	Funkcio
1974	2002	Tarragona	Redaktoro	DK	Kasisto
2002		Plovdiv	L. Vignaud	FR	Kasisto
1998	2010	Aalborg	R. Bolognesi	IT	Prezidanto
2010		Sofia	R. Todor	RO	Prezidanto
1998	2001	Aalborg	E. Quietensky	AT	Sekretario
2001	2010	Tábor	M. Brletić	HR	Sekretario
2010		Sofia	V. Tornillo	IT	Sekretario
1988	2010	Perpignan	I. Gulyás	HU	Vicprezidanto
2010	2016	Sofia	S. Lafargue	FR	Vicprezidanto
1998	2010	Aalborg	J. Ripoché	FR	Redaktoro
2010	2016	Sofia	I. Gulyás	HU	Redaktoro
2016	2019	Varna	G. Brandenburg	DE	Redaktoro
2019		Málaga	L. Kovář	CZ	Redaktoro
2015		Dijon			Gvidanto de FK

Honoraj prezidantoj

Jaro	IFK	Nomo	Lando
2009	Trieste	R. Bolognesi	Italio

Honoraj membroj de IFEF

Jaro	Nomo	Lando
1997	De Sutter, Lucien	BE
2000	David, Jaroslav	CZ
2006	Nobuki, Naosuke	JP
2007	Robiolle, Pierre	FR
2008	Stuppnig, Martin	AT
2009	Gulyás, István	HU
2010	Brletić, Marica	HR
2010	Ripoche, Jean	FR
2016	Tomášek, Jindřich	CZ
2016	Litov, Georgi	BG
2018	Kovář, Ladislav	CZ

Honoraj membroj de FISAIC

Jaro	Nomo	Lando
1998	De Sutter, Lucien	BE
2007	Abelovská, Anna	CZ

Honorigitaj per speciala FISAIC-medalo

Jaro	Nomo	Lando
1967	Geroldinger, Johann	AT
1994	Robiolle, Pierre	FR
1998	Engen, Per	NO
2010	Huber, Walter	AT
2012	Tomášek, Jindřich	CZ

Kvankam tiu listo (Honorigitaj per speciala FISAIC-medalo) temas nur pri vivantaj homoj, Per Engen, kiu forpasis 25/5-2014, estas en la listo. Li ricevis la oran medalon de FISAIC en 1998, sed tiu novaĵo ne atingis la Historian Suplementon 1984-1999 de IFEF.

Honoraj membroj de UEA

Jaro	Elektita en UK	Nomo	Lando
2003	Göteborg	Imre Ferenczy	HU

La internacia organo

Dum ĉiuj jaroj de la ekzisto de IFEF, ĉu dum bonaj, ĉu dum malbonaj tempoj, la federacia organo IF aperas kaj estas la interliga ĉenparto, kiu donas al la membroj ĉiujn informojn pri la organizo ...

- Raportas pri la okazinta kongreso – koncizaj kaj personaj rakontoj
- Informas pri la okazonta kongreso
- Publikigas fakajn kontribuojn de membroj de la diversaj landoj
- Informas pri la asocioj, al kiuj IFEF apartenas - UEA, FISAIC ...
- ...

IF vere dum la multaj jaroj plenimus kaj plenumas ankoraŭ tiun sian multflankan taskon.

La bulteno daŭre aperas sesfoje jare kun entute 120 paĝoj (kutime), kaj ĝi estas belaspekta, alloga kaj interesa.

La redaktoroj estis kaj estas:

Jean Ripoche	1998-2010
István Gulyás	2011-2016, gvidanto de redaktora komisiono
Guido Brandenburg	2016-2019, gvidanto de redaktora komisiono
Ladislav Kovář	2019-, gvidanto de redaktora komisiono

Fakaj komisionoj

La unuajn kaj tre gravajn paŝojn en la faka laboro faris Heinz Dieter Hartig kaj Gernot Ritterspach (ambaŭ de Germanio). De 1993 ĝis 2000 József Halász gvidis la fakan laboron, sed dum la kongreso en Budapeŝto 2000 Jan U. Niemann fariĝis gvidanto de FK, Faka Komisiono, kun du sekretarioj pri FAS (Fake Aplika Sekcio) kaj TS (Terminara Sekcio). Tiu 'konstruo' de la komisiono ankoraŭ funkcias.

A: Terminara Sekcio

Jam elektita en 1998 kiel korespondanto por la terminologia grupo de UIC, Heinz Hoffmann, dum la tuta periodo ĝis sia morto prizorgis tiun laboron.

La taskoj de Terminologia Grupo estas:

1. koncepti la terminologio-politikon de UIC
 2. revizii la kvaliton de la datumbanko „*RailLexic*“ kaj proponi koncernajn plibonigojn
 3. response observi tradukadon de *RailLexic*-terminoj
- ... kaj IFEF aktive kunlaboras kaj estas en tiu grupo akceptita kiel ŝtata fervojo kaj havas konsilantan statuson.

Kiam la datumbanko RailLexic “iris en la reton”, ankaŭ IFEF ricevis senpagajn alirojn por tiuj membroj, kiuj laboras pri terminoj kaj fake aplika laboro.

B: Fake Aplika Sekcio

La Fake Aplika Sekcio de Faka Komisiono prizorgas

1. Redakton kaj eldonon de FFK (ĝis nun entute 27 artikol-kolektoj)
2. Fakan programon dum IFK – ĉefan fakprelegon kaj aldonajn prelegetojn
3. Korektlegadon (se dezirate) de artikoloj por IF

Dum la tuta periodo pli kaj pli kreskis la intereso por tiu tre grava laboro de IFEF. Ekde la jaro 2000 ĉiam dum la granda foiro INNOTRANS

(ĉiun duan jaron en Berlino) renkontiĝas IFEF-anoj por krei kontaktojn, la fervoja mondo evoluas, kaj ankaŭ ni devas atente evolui kun ĝi.

La ĝisnuna kulmino de la fake aplika laboro estas subskribo de kunlabora kontrakto inter Transporta Fakultato *Jan Perner* de Universitato *Pardubice* kaj IFEF en 2019 kaj la unua prelegseminario en Pardubice en la sama jaro.



Fervoj-Fakajn Kajerojn preparas la Fake Aplika Sekcio

IFEF kaj FISAIC

Multaj landaj asocioj estas pere de siaj naciaj fervojlibertempaj asocioj membroj de FISAIC, kaj la plimulto de la IFEF-kongresoj okazis sub aŭspicio de FISAIC. Eĉ kelkaj IFEF-anoj estis landaj reprezentantoj aŭ havis aliajn postenojn ĉe FISAIC, krom ke ĉiam la prezidanto de IFEF estas membro de la teknika prezidantaro de FISAIC. En pluraj landoj la IFEF-laboro instigis al membreco de FISAIC. En Bulgario kaj Italio, ekzemple, la IFEF-landa asocio fariĝis FISAIC-disciplina membro.

En 2014 IFEF fariĝis plenrajta membro de FISAIC kiel ĉiuj aliaj naciaj fervojlibertempaj asocioj. Tiun specon de membreco oni ne antaŭe konis. Nun IFEF partoprenas eĉ pli la vivon de FISAIC, povas utiligi la aŭspicion kaj povas influi al la laboro kaj strategio de FISAIC.



La IFEF-kongresoj 2000-2019

N-ro	Jaro	Loko	LKK-prez.	Partopr.	Landoj
51	1999	Le Mans, FR	Robiolle, P.	277	21
52	2000	Budapest, HU	Gulyás, I.	277	25
53	2001	Tábor, CZ	Chrdle, P.	194	18
54	2002	Plovdiv, BG	Karakašev, L.	203	17
55	2003	Dresden, DE	Terjung, R.	254	19
56	2004	Sopron, AT/HU	Gulyás, I.	193	20
57	2005	Braşov, RO	Todor, R.	274	22
58	2006	Shanghai, CN	Sen, L.	224	18
59	2007	Paris, FR	Lafargue, S.	258	20
60	2008	Poznań, PL	Libner, W.	169	17
61	2009	Trieste, IT	Bolognesi, R.	220	19
62	2010	Sofia, BG	Aleksandrova, P.	103	18
63	2011	Liberec, CZ	Kovář, L.	173	18
64	2012	Herzberg/Harz, DE	Meinel, A.	160	21
65	2013	Artigues, FR	Lafargue, S.	260 *)	19
66	2014	San Benedetto, IT	Tornillo, V.	136	19
67	2015	Kunming, CN		250 **)	13
68	2016	Varna, BG	Aleksandrova, P.	90	12
69	2017	Colmar, FR	Ripoche, J.	170 ***)	21
70	2018	Wrocław, PL	Libner, W.	124 ****)	20
71	2019	Málaga, ES	Spinola, C. G.	180 *****)	24

*) Kune kun UFE

**) Kune kun ĈEL

***) Kune kun Espéranto France-Est kaj TAKE

****) Kune kun Silezia Esperanto-Asocio

*****) Kune kun HEA kaj AEU

La IFES-oj 1985-2019 (kompletige al Historio 1909-1984)

N-ro	Jaro	Loko	Gajninto de la IFEF-premio
26	1985	Morzine, FR	John, F. (FR)
27	1986	Sils-Baseglia, CH	Kondiĉoj ne plenumitaj
28	1987	Sarajevo, YU	Kondiĉoj ne plenumitaj
29	1988	Spitzingsee, DE	Mortensen, E. (DK)
30	1989	Mühlbach, AT	Pinet, T. (FR)
31	1990	Campo Tures, IT	Vonay, J. (FR)
32	1991	Les Contamines-Montjoie, FR	Vignaud, L. (FR)
33	1992	Vrátna-Valo, SK	Theurich, H. (DE)
34	1993	Hasliberg, CH	Ehrlich, B. (DE)
35	1994	Poiana- Braşov, RO	Peyrouty, H. (FR)
36	1995	Mühlbach, AT	Röder, V. (DE)
37	1996	Kouti, CZ	
38	1997	Mühlbach, AT	
39	1998	Maribor, SL	Mevel, J. (FR)
40	1999	Karpacz, PL	Pintér, M. (HU)
41	2000	Saint-François-Longchamp, FR	Røssum, A. (DK)
42	2001	Tatranská Lomnica, SK	
43	2002	Predeal, RO	Todor, R. (RO)
44	2003	Kunčice pod Ondřejníkem, SK	
45	2004	Argentièrè, FR	
46	2005	La Molina, ES	
47	2006	Bansko, BG	
48	2007	Azuga, RO	
49	2008	Poiana- Braşov, RO	
50	2009	Braşov /Fagarasi, Sambata, RO (50a IFES kaj 1a VIFES)	

Ĉefaj fakprelegoj kaj ekskursoj 1999-2019

Jaro	Loko	Temo	Aŭtoro
1999	Le Mans, FR		
2000	Budapest, HU	Problemo de la Hungaraj Ŝtatfervojoj: la traknivelaj trapasejoj Ekskurso al infanfervojo	Halász, J.
2001	Tábor, CZ	Moderna sekuriga kaj komunikada tekniko de la Ĉeĥaj Fervojoj Ekskurso per antikva elektra lokomotivo de 1903 al <i>Bechyně</i>	Kovář, L.
2002	Plovdiv, BG	Reformo de BDZ – paŝo al integri-ĝo al la Eŭropa transporta sistemo	Enev, E.
2003	Dresden, DE	Teknikaj evoluoj por la estonto de la eŭropa fervojtrafiko Ekskurso al Fervoja Fakultato de Teknika Universitato	Ehrlich, B.
2004	Sopron, HU	Interŝtata fervojo GySEV – ROeEE	Tschomm, F.
2005	Braşov, RO	La modernigo de la fervojaj teleregadaj sistemoj por la realigo de la interkunlaborado en tra-eŭropaj koridoroj Ekskursoj al Regejo de <i>Braşov</i> kaj Fervoja muzeo en <i>Sibiu</i>	Buciuman, I.
2006	Shanghai, CN	Ĉina fervojo sur la mondfirsto Ekskurso per Magnetŝveba fervojo de <i>Shanghai</i>	Zuwu, H.
2007	Paris, FR	Malfermo de nova linio por grandrapidaj trajnoj al Oriento Ekskurso al Fervojteknika Prov-Centro en <i>Vitry-sur-Seine</i>	Ripoche, J.
2008	Poznań, PL	Modernigo de poznana fervojnodo en jaroj 2006-2008 Ekskursoj al Lokomotivremizo <i>Wolsztyn</i> kaj mallarĝŝpura fervoja muzeo Wenecja, dum la postkongreso vizito al la fervojmuzeo en <i>Warszawa</i>	Bresch, A.

2009	Trieste, IT	Evoluo de la grandrapida / grandkapacita (AV/AC) fervojtrafiko kaj de la eŭropa komando-sistemo ERTMS en Italio Ekskurso al Fervoja Muzeo de <i>Trieste</i>	Tornillo, V.
2010	Sofia, BG	Rekonstruo kaj modernigado de fervojlinio <i>Plovdiv – Svilengrad</i> ĉe turka-greka landlimo	Maglov, A.
2011	Liberec, CZ	Sekurec- kaj komunikad-instalaĵoj je fervojoj de administracio por fervoja trafikvojo Ekskurso per Telfero al <i>Ještěd</i>	Kovář, L.
2012	Herzberg, DE	La baltmara tunelo. Nova interligo al Skandinavio Ekskurso al <i>Wernigerode</i> per Harca mallarĝŝpura fervojo	Niemann, L.
2013	Artigues, FR	La bordoza tramo kaj ties moderna APS-sistemo Ekskurso al Bordoza tramvoj- riparejo kaj -remizo	Lafosse, M.
2014	San Benedetto, IT	La nova Bolonja stacio por grandrapida trafiko kaj la novaj italaj motorvagonaroj <i>Frecciaros</i> -sa ETR 1000 por grandrapidaj trajnoj	Tornillo, V.
2015	Kunming, CN	Pri fervoja vagonriparado kaj informigo de la produkta administrado	Chen, Y.
2016	Varna, BG	Fervojo de la estonteco	Aleksandrova, P.
2017	Colmar, FR	Kial dekstre en Alzaco kaj Loreno? Ekskurso al <i>Cité du train</i> (fervoja muzeo), <i>Mulhouse</i>	Vignaud, L.
2018	Wrocław, PL	Rekonstruado de fervojaj arkadoj en <i>Gorzów Wielkopolski</i> Ekskurso al Fervoja muzeo <i>Jaworzyna Śląska</i>	Libner, W.
2019	Málaga, ES	Veturado tra interplaneda spaco	Spinola, C. G.

Landaj asocioj

Aŭstra Fervojista Esperanto-Asocio (AFEF)

Re-inaŭguro de ZEO ĉe la ĉefstacidomo en Linz okazis en 2006 kun partopreno de honoraj gastoj, i.a. la urbestro kaj la kulturespondeculo de Linz. La tiama prezidanto de IFEF Romano Bolognesi partoprenis la solenaĵon kune kun la ĉefkomitatano Jindřich Tomíšek.

Belga Esperanto Fervojista Asocio (BEFA)

Dum la periodo ĉiam belgoj partoprenis la kongresojn kaj multe kontribuis per subteno de la laboro en novaj membrolandoj, sed estis ĉefe individuoj, kaj la membronombro de BEFA daŭre malkreskis, ĝis la landa asocio ĉesis funkcii 31/12-2016. Daŭre estas kelkaj individuaj membroj de IFEF en Belgio. En 2019 restariĝis BAFE, Belga Amikaro de Fervojistoj Esperantistoj.

Britio

Jam en la Kompletiga Suplemento de 1999 estis menciita la fakto, ke la brita sekcio oficiale ĉesis ekzisti en 1993. La lasta sekretario, Frank Curtis, tenis la kontakton kun IFEF pere de FFEA kaj DEFA. Frank Curtis forpasis en 2018. Nun estas persono, kiu loĝas en Londono, kun kiu IFEF havas retan kontakton.

Fervojista Sekcio de Bulgara Esperanto-Asocio (BFES)

En 1999 estis en Bulgario ĉ. 250 membroj en 11 societoj – komence de 2019 la 105 membroj de BFES (el tiuj 15 IFEF-membroj) formas kvin grupojn. Bulgario okazigis tri kongresojn en la periodo: 2002 en Plovdiv, 2010 en Sofio kaj 2016 en Varna.

En 2003 estis eldonita Esperanto-bulgara teknika vortaro. BFES membras en FISAIC kaj en la periodo oni okazigis plurajn eventojn tiukadre.

Fervojista Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, de 2009 Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA)

La ĉeĥa landa asocio estas forta kaj vigla. En la periodo du kongresoj okazis en Ĉeĥio, en *Tábor* 2001 kaj en *Liberec* 2011. Ambaŭ kongresoj estis bone organizitaj kun riĉa programo. La membroj de la ĉeĥa landa asocio same vigle partoprenas la fervojistajn kongresojn kaj grave kontribuas al la faka programo per prelegoj kaj prezentoj.

Precipe por la fake aplika flanko de la IFEF-laboro la ĉeĥaj membroj grave kontribuas... per artikoloj por IF kaj eĉ per tute nova 'novaĵ-universo': 'El fervoja Mondo', kiu provizas la retpaĝaron de IFEF per mallongaj novaĵ-artikoloj kun la plej diversaj temoj de la plej diversaj landoj.

La du- kaj plurlandaj aranĝoj, kiujn partoprenas kaj aranĝas la ĉeĥa landa asocio, estas gravaj kaj utilaj por la federacio, kaj kiam la ĉeĥa landa asocio invitas al jarkunveno, plej ofte eksterlandaj gastoj partoprenas.

En 2009 la asocio fariĝis jure memstara, sendepende de ĈEA.

En februaro 2019 okazis en Universitato *Pardubice*, Trafikfakultato seminario pri Eŭropaj fervojoj. Prelegis fakuloj el kvin landoj, membroj de IFEF. Samtempe estis subskribita kontrakto pri kunlaboro de la Universitato, ĈFEA kaj IFEF.

Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA)

Kvankam estas nur malmultaj IFEF-membroj en Ĉinio, estas multe pli da membroj en la kluboj en diversaj provincoj kaj urboj, kiel en multaj aliaj landoj. Bona afero estas, ke la membroj estas averaĝe multe pli junaj ol la membroj en la plimulto de la aliaj landoj.

Ĉinio organizis en la periodo du kongresojn de IFEF: en 2006 kaj 2015. Ĉinio prezentis prelegojn dum diversaj kongresoj kaj kontribuis per artikoloj en IF. Interne oni aranĝas kursojn kaj staĝojn, ofte en diversaj laborlokoj fervojaj.

Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)

Post organizo de IFK en 1998 ne okazis internaciaj eventoj en Danio, la membronombro ekde tiam daŭre malkreskas. La dana asocio tamen sukcesis ĝis nun kontribui aktive al la internacia laboro, precipe rilate al la faka laboro. En 2000 Jan Niemann fariĝis gvidanto de Faka Komisiono; estas posteno, kiun li daŭre posedas. Ekde 2015 li en tiu funkcio eniris la IFEF-estraron.

DEFA kontribuis ankaŭ per kunlaboro pri la ĉiujaraj FFK-oj.

Estonio

Ne estas aktivecoj fervojistaj en Estonio, almenaŭ ne sur organizita nivelo. Jam en la historia suplemento 1984-1999 oni skribis, ke oni kuniĝas kadre de Esperanto-Asocio de Estonio.

Finnlando

Jam fine de 1995 la finnlanda landa asocio estis malfondita. Yrjö Hiltunen tenis la kontakton al IFEF ĝis sia morto en 2012.

Franca Fervojista Esperanto-Asocio (FFEA)

De la jaro 1996 ĝis la jaro 2004 la asocion gvidis Jean Ripoché, kiu en tiuj jaroj oficis ankaŭ kiel ĉefkomitatano de IFEF en la jaro 1997, kaj estis IFEF-redaktoro de la jaro 1998 ĝis la jaro 2010.

En la jaro 2004, la FFEA-prezidantecon transprenis Sylviane Lafargue. De la jaro 2010 ĝis la jaro 2014 ŝi ankaŭ estis vic-prezidentino de IFEF kaj komitatano "A" de IFEF ĉe UEA.

En la periodo 1999-2018 FFEA kvarfoje transprenis la taskon organizi la IFEF-kongreson: en urboj *Le Mans* (1999), *Paris* (2007), *Artigues-près-Bordeaux* (2013) kaj *Colmar* (2017). Ankaŭ la Internacia Fervoja Esperanto-Skiseĵoj okazis dufoje en Francio, en *Saint-François-Longchamp* (2000) kaj *Argentièr* (2004).

En kampo de varbado, direkte interalie al fervojistoj, pluraj staĝoj okazis en Francio, interalie en *Paris*, *Nilvange*, *Lyon*, *Toulouse*, *Chamonix* kaj ankaŭ ekster Francio en urbo *Dobřichovice* apud Prago (Ĉeĥio) kunlabore kun ĉeĥaj samideanoj. Same reklamcele FFEA regule organizis kelkajn prelegojn kaj partoprenis en kelkaj reklam-aranĝoj (ekz. budoj, ekspozicioj) por diskonigi Esperanton en la fervoja medio. Lokaj grupoj ankaŭ partoprenis en tiu agado, interalie en *Caen*, *Paris*, *Toulouse* kaj *Lyon*, kun organizado de staĝoj, kulturaj tagoj ktp.

Ankaŭ en la 21-a jarcento FFEA plu eldonis dulingvan bultenon kaj okazigis jarkongreson, plej ofte kun partopreno de eksterlandaj IFEF-membroj kaj kelkfoje ankaŭ gastigante IFEF-estrarkunsidon.

Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA)

Dum multaj jaroj kiel en aliaj landoj la fervojo per sia socialorganizo subtenis la aktivecojn. Sekve de la fervoja reformo la socialorganizo 1997 ŝanĝis sian juran formon kaj daŭrigis sian laboron kiel fonduso kun ŝanĝita financa koncepto. La subteno de GEFA kiel kultura kaj libertempa asocio provizore estas sekurigita.

Germanio estas granda landa asocio, kiu ĉiam provizis IFEF per funkciuloj (el kiuj kelkaj fariĝis honoraj membroj).

Dum la tie ĉi prilumita periodo Heinz Hoffmann estis sekretario de Terminara Sekcio de Faka Komisiono kaj redaktoro de Terminara Kuriero, senlaca, ĝis malsano komence de 2018 malebligis al li normale vivi kaj aktivi.

Kvankam la membronombro dum la periodo malkreskis, GEFA sukcesis daŭrigi sian asocian laboron, eldonis sian bultenon “Fervoja Esperantisto”, okazigis jarkunvenojn kaj aliajn tradiciajn kunestadojn, tutlande kaj en la regionaj grupoj.

GEFA organizis la IFK-ojn 2003 en Dresden kaj 2012 en Herzberg/Harz. Menciinde estas, ke Herzberg/Harz (iama loĝloko de Joachim Gießner) ekde 2006 oficiale portas la nomon „Esperanto-urbo“.

Hispana Esperanta Fervojista Asocio (HEFA) - Kataluna Esperanta Fervojista Asocio (KEFA)

En 2005, de la 23-a ĝis la 28-a de januaro okazis la 46-a IFES en *La Molina*, en la katalunaj Pireneoj.

Ankaŭ en 2005, kiam RENFE (la hispana ŝtata fervoja kompanio) bezonis renovigi la Stacidomon de *Clot-Aragó* de Barcelono, HEFA luis novan sidejon en Stacidomo de *L'Hospitalet de Llobregat* (apud Barcelono) – kontraŭ pago de lu-prezo kaj asekuro. Jam tiam RENFE ne plu konsideris la Esperanto-fervojistojn kiel kulturen asocion.

Kun bazo en tiu nova sidejo la asocio bone funkciis ... kunvenoj, festoj, prelegoj, kursoj, ekskursoj. Ankaŭ ‘eksterdome’ oni prelegis pri lingvaj problemoj kaj pri la neceso de internacia lingvo, kaj la membroj fidele vizitis la IFK-ojn. Kun nova statuto oni prezentis al la Generalitato de Katalunio la asocion kun la nova nomo Kataluna Esperanta Fervojista Asocio (KEFA). Sed jam en 2007 oni devis denove translokiĝi al malpli granda sidejo, kie ne estis ebleco kunveni, havi librojn ktp. Ekde tiam la aktivecoj malplimultiĝis, kaj la membronombro malkreskis. La 5-an de januaro 2018 KEFA oficiale malfondiĝis.

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio (HFEA)

HFEA aranĝis en 2000 la IFK-on, en Budapeŝto partoprenis 277 homoj de 22 landoj en bela semajno kun riĉa programo.

En tiuj jaroj la hungara fervojista Esperanto-movado progresis, kaj oni havis bonan kontakton kun MÁV (la hungara ŝtata fervoja kompanio). Poste, kiel en multaj landoj, ŝanĝiĝis la situacio kaj kondiĉoj, kaj oni devis trovi novajn vojojn, kaj HFEA serĉis kunlaboron kun la landa sekcio de FISAIC.

HFEA ĉiujare formulis jaran laborplanon, difinis gravajn taskojn kaj farendaĵojn. Precipe per 'Kampanjo 2000' oni celis antaŭenigi la movadon en Hungario.

La estraro de IFEF kunsidis okfoje en Hungario, kaj tiujn kunvenojn HFEA aranĝis kun ĉiuj taskoj rilataj.

Jam en 2004 HFEA denove organizis IFK-on. La 56-a IFK okazis en la Eŭropa-premia urbo *Sopron* kiel kunlaboro inter la aŭstra kaj la hungara landaj asocioj kun la slogano '*Unuecan Eŭropan Fervojon*'.

Internaciaj aranĝoj, kursoj, prelegoj, kaj ekskursoj estas ĉiam taskoj, pri kiuj HFEA kaj la membroj okupiĝas.

Israelo

En Israelo neniam ekzistis landa asocio, sed dum kelkaj jaroj estas individua membro, Jehoŝua Tilleman, kiu partoprenis kelkajn kongresojn.

Itala Fervojista Esperanto-Asocio (IFEA)

La itala landa asocio dum la periodo aranĝis prelegojn, kursojn kaj ekzamenojn hejme en Italio. Ĉiuseptembre okazis "Kultura Semajno de Libera Tempo" en *Plan Val Gardena* kadre de DLF. Italoj ĉiam partoprenas IFK-ojn kaj ankaŭ mem organizis, en 2009 en Trieste kaj 2014 en *San Benedetto del Tronto*. Por la IFK-aj fakaj programoj plej ofte kontribuas Italio.

Ĉar pluraj italoj, ne malplej Romano Bolognesi, havis estrarpostenojn, ankaŭ IFEF-estrarkunvenojn oni aranĝis.

Ankaŭ jarkunvenojn de aliaj landaj asocioj italoj ofte partoprenis, same kiel oni kontribuas al la italaj landaj kongresoj kaj al la UK-o okazinta en Italio en 2006.

Japana Esperantista Ligo Fervojista (JELF)

En 2004 JELF preparis fervojfakan vortareton japane-esperante kaj inverse.

En la periodo estis regule kontakto kun JELF, sed ankaŭ en Japanio oni spertis, ke kondiĉoj ŝanĝiĝas, kaj JELF ĉesis funkcii 31/12-2018.

Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE)

Dum la maltrankvilaj jaroj komence de la 1990-aj jaroj okazis multaj ŝanĝoj en la regiono, sed JAFE vivis kaj aktivis ĝis 2003-2004. Tiam fondiĝis la ŝtato Serbio kaj Montenegro, kiu ekzistis ĝis 2006. Ekde tiam du ŝtatoj estas sendependaj. En Serbio tiam restis du aktivaj Esperanto-societoj: FES „Branko Maksimović“ en Beogrado kaj FES „Mile Veličković“ (urba kaj fervojista E-societoj unuiĝis) en Niš. Post forpaso de prezidantino de FES „Branko Maksimović“ en fervoja entrepreno en Beogrado (serbaj fervojoj) ne restis aktivaj esperantistoj, kaj FES ne ekzistas.

Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA)

En 1998 la kroata societo estis registrita sub nova nomo – Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA).

Kunvenoj de KFEA okazas ĉiumarde, krom dum la somerferio kaj dum festotagoj. La enhavo estas tre multflanka, fervojaj temoj, lingvaj temoj, vojaĝoj, raportoj kaj rakontoj pri IFEF, pri kongresoj, raportoj pri partoprenoj kaj prelegoj dum sesioj de AIS *San Marino*, kaj pri aliaj aktivecoj de la membroj.

En 2001 okazis la 86-a Universala kongreso en Zagreb, kaj kelkaj IFEF-membroj estis helpantoj okaze de akcepto de gastoj, en kongresaj spacoj kaj dum ekskursoj.

Estis prelego kun la titolo "Per trajno tra Kroatio" kaj vizito al Fabriko de fervojaj veturiloj (TŽV) *Gredelj*. En Zagreb okazis kongreso de SAT en 2005, kie ankaŭ kelkaj partoprenis.

Kroataj gekolegoj aktive kunlaboras kun AIS *San Marino*, per prelegoj diverstemaj, aranĝis E-kursojn kaj konversaciajn rondojn kaj kunlaboras kun Kroata Esperanto-Ligo (KEL).

Dum multaj jaroj KFEA kunlaboris kun Asocio de kultur-arta societo de Kroataj fervojoj, sed ekde 2014 la kroataj fervojoj ne plu subtenas kulturajn aktivecojn inter fervojistoj.

En 2004 KFEA eldonis libreton "Niaj kvindek jaroj" 1954-2004 okaze de la 50-jara jubileo, kaj dek jarojn poste oni same solene festis pro la jubileo de la asocio.

Dum IFK-oj KFEA ĉiam kontribuas per faka prelego kaj cetere aktive partoprenas la organizajn, fakajn kaj turismajn flankojn de la kongresoj.

Kubo

Okazis pluraj kontaktoj en la daŭro de la jaroj kun Kubo, kaj fakte ankaŭ plurfoje ekestis landa asocio, sen tro granda sukceso, precipe pro la ĝeneralaj kondiĉoj en Kubo.

Ĝuste nun ekzistas landa asocio, sed ne eblas rakonti pri aktivecoj, ĉar la asocio fondiĝis nur en 2017.

Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda (FERN)

Jam en la Kompletiga Suplemento 1984-1999 oni skribis, ke ne estas multe da aktiveco en Nederlando. Wim van Leeuwen forpasis en 2004, kaj la landa asocio ĉesis ekzisti la 31an de decembro 1999.

Estas individua membro en Nederlando, nome Gerry Schavemaker, kiu regule partoprenas la IFK-ojn.

Norvega Esperanta Fervojista Asocio (NEFA)

Jam antaŭ la jarmilŝanĝo la norvega landa asocio suferis pri malkresko de membronombro, kaj la aktivecoj ne estis multaj. Tamen al la Fervoj-Fakaj Kajeroj oni multe kontribuis ... fakte la ideo ekestis siatempe en Norvegio.

Dum la pasintaj jaroj la norvegaj IFEF-membroj aktive partoprenis kongresojn kaj aliajn aranĝojn, sed bedaŭrinde kiel en aliaj landoj la asocio ne sukcesis altiri novajn, pli junajn membrojn, kaj la landa asocio ĉesis ekzisti en 2014.

Pola Esperantista Fervojista Asocio PEFA

Post kelkara neaktivado komence de la 21-a jarcento la polaj esperantistoj fervojistoj kadre de PEFA refunkciis. Okazis tio dank' al la ĉefkomitatano Jindřich Tomášek dum turisma kunveno de dekelkaj fervojistoj-esperantistoj. Oni elektis la novan estraron en februaro 2005. En la jaro 2006 okazis pola fervojista kongreso en Siedlce. PEFA ĝis nun agas enkadre de Societo de Apogoj de Turismo Sporto kaj Kulturo "Kolejarz" (Fervojisto). La "Kolejarz" i.a. ano de FISAIC helpis sendi delegitojn al la 57-a IFK en *Braşov* kaj al la 59-a IFK en Parizo. En Parizo IFEF findecidis aranĝi la 60-an Internacian Fervojistan Kongreson en Poznano. La IFK havis riĉan fakan programon kun prelegoj en sidejo de Polaj Fervojaj Linioj kaj ekskurso al novkreita Loka Centro de Stirado en fervoja nodo Poznano. Krome okazis arta programo kun prezento de lokaj spertaj ensembloj kaj oni ekskursis al famaj lokoj kiel *Gniezno* kaj *Biskupin* kun ekskurso per mallarĝspura fervojlinio al fervoja muzeo. Dum 3 sekvaj jaroj oni eldonadis informilon pola-Esperanto "Verda Vojo". Post la kongreso en Poznano ĉesis helpo de "Kolejarz", sed la anoj estis aktivaj partoprenante dum IFK-oj. Kunlaborante kun ĉinaj esperantistoj fervojistoj PEFA helpis al ĉinaj grupoj veni al kongresoj en *Varna* kaj *Colmar*.

En jaro 2018 PEFA kunlabore kun Silezia Esperanto-Asocio organizis la 70-an IFK en Vroclavo. Helpe de Polaj Ŝtataj Fervojoj kaj Sileziaj Fervojoj dum la kongresa semajno oni uzis Sesian Salonegon en renovigita Vroclava Stacidomo kaj oni ofertis tre riĉan kaj varian programon.

En sekva Kongreso en Malago en jaro 2019 Pollando estis reprezentita per 6 anoj. La PEFA-anoj ofte renkontiĝas fine de septembro dum Artaj Konfrontoj en Esperanto (Arkones.org), kiu okazas en Fervojista Kulturdomo en Poznano – samloke sidejo de PEFA. PEFA bone kunlaboras kun najbaraj IFEF-Asocioj en Ĉeĥio kaj Germanio kaj lokaj Esperanto-asocioj.

Rumanio

REFA estas stabila asocio, kiu en la periodo havis nur du prezidantojn, kiuj bone gvidas la membrojn kaj la asocion.

REFA organizis IFK-on en 2005, kiam por la unua fojo IFK okazis en Rumanio, kun bona organizado, varia programo kaj neforgesebla postkongreso.

Ankaŭ rilate al IFES la rumana landa asocio prenis kaj portis grandan respondecon. Kiam la intereso pri IFES stagnis komence de la nova jarmilo, REFA organizis kvarfoje IFES-on en Rumanio, kaj por la kvina fojo oni faris samtempe IFES-on kaj VIFES-on – tiel la vico de IFES-oj atingis 50. Estis brava kaj bona kontribuo al la vivo de la federacio.

REFA havas aktivajn klubojn en la plej grandaj urboj de Rumanio.

En Rumanio oni organizas staĝojn por instruado kaj lingva klerigado, ankaŭ kun turisma enhavo, fakte organizado estas grava kompetenteco ĉe la rumana landa asocio.

La membroj aktivas ne nur en IFEF, sed ankaŭ en aliaj Esperanto-organizoj, kaj Rumanio partoprenas la fakan laboron de IFEF per prelegoj kaj artikoloj.

Multajn funkciajn postenojn de IFEF la rumanaĵ membroj posedis kaj posedas ... kun plej granda 'ekstera vizaĝo' la prezidanto de IFEF estas ekde 2010 Rodica Todor.

Serbio

Post la ĉeso de FES (vidu sub JAFE) estas du kontaktpersonoj en Serbio - Dimitrije Janičić en Beograd kaj Nebojša Stanković en Niš, kun kiuj IFEF tenas retan kontakton. Post la ĉesigo de JAFE neniam ekestis landa asocio en Serbio.

Slovakia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj (SAFE)

En 2001 SAFE invitis al la 42-a IFES, kaj SAFE ĝis 2003 havis la postenon de anstataŭantino de la ĉefkomitatano.

Iom post iom la slovakaj esperantistaj fervojistoj perdiĝis (pro diversaj kialoj), kaj pli-malpli dudek jarojn post sia fondiĝo SAFE praktike ĉesis ekzisti, kvankam ne 'oficiale', ĉar la nomo de SAFE ankoraŭ troveblas en la slovakaj listo de societoj.

Slovenio

Ŝanĝo de multaj kondiĉoj en la regiono fine de la malnova jarmilo influis ankaŭ al la vivo de Esperanto-movado. La societo en Ljubljana ĉesis ekzisti, kaj restis nur Fervojista Esperanto-Societo *Maribor* (FES *Maribor*), kiu daŭre aktivas, kaj kiu en 2018 povis festi sian 60-jariĝon. FES Maribor estas ankoraŭ ligita al IFEF kiel 'Fakkomitato de Fervojistoj Esperantistoj en Slovenio' kaj tiel reprezentas slovenan asocion. FES sukcesis dum la lastpasintaj jaroj pri pluraj menciindaj aferoj. Ekz-e en 2011 oni celebris la 20-jaran datrevenon de la ŝtata sendependado per eldono de memoraj poŝtmarkoj.

Ekspozicio pri Hiroŝimo estis montrita en Muzeo de nacia liberigo Maribor kaj poste en aliaj muzeoj de Slovenio, - la ekspozicio estis frukto de amikaj kontaktoj kun esperantistoj de Japanio. En 2014 aperis la dua eldono de modernigita kaj etendita lernolibro Esperanto por fervojistoj (aŭtoro Gvozden Sredić).

Svedio

La Sveda asocio ne plu ekzistas, sed ni havas svedan individuan membron Gunnar Olsson kaj kontakton cetere kun Rickard Vesterberg.

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF)

La svisa landa asocio jam antaŭ tiu periodo malfortiĝis, kaj unuopuloj tenis la kontakton al IFEF kaj al la amikoj. SAEF oficiale malfondiĝis fine de 2004 kaj donis sian kasenhavon al la kaso de IFEF.

Bibliografio de Fervoj-Fakaj Kajeroj n-roj 8-27

8	La nova duetaĝa Intercity-navettraĵo de la svisaj Federaciaj Fervojoj (SFF)	Glättli, E.	CH
	La Arbara Fervojo en la regiono Čiermy Hron (Čiernohronská Lesná Železnica – ČHŽ)	Feifičova, M.	SK
	Konciza historio de terminara laboro ĉe IFEF	Hoffmann, H.	DE
	Metroo en Kopenhago	Olsen, E.H.	DK
9	Plano pri elkonstruo de la dana fervojreto	Olsen, E.H.	DK
	La energi-provizado de la svisaj fervojoj	Glättli, E.	CH
	Kopenhaga metroo	Olsen, E.H.	DK
	Stato de la firma ligo trans la Sundon	Olsen, E.H.	DK
	La unua svisa pasaĝertraĵo kun kliniĝtekniko	Glättli, E.	CH
10	Bonaj trajnoj por ĉiuj	Olsen, E.H.	DK
	Rekonstruo de fervojaj koridoroj en Ĉeĥa respubliko	Tomíšek, J.	CZ
	Ŝanĝo de naturo per konstruado de fervojlinioj	Sekereš, L. Sredič, G.	YU YU
	Eksteraj kostoj de trafiko	Sonntag H.	AT
	Apliko de lumo-ondo-kondukiloj por telekomunikado, sekurigaj instalaĵoj kaj teleregado ĉe la Aŭstriaĵ Ŝtataj Fervojoj (OEBB)	Werner, J.	CZ
	Klasifiko en terminologia procedo	Marek, J.	
	Diagnostiko de staciaj sekuriginstalaĵoj tipo DIAB-2	Kovař, L.	CZ

11	Kalkuloj pri la sociaekonomika efikeco de pasaĝertransporto laŭ merkataj segmentoj	Koleva, R., Prodanov, K.	BG
	Variant-organizado ĉe transporto de pasaĝeroj kadre de la urbo Sofio en 2002	Saliev, A., Ananiev, S.	BG
	Kvalito de la pasaĝerservoj ĉe fervoja transporto	Saliev, A. Miĥajlov, R.	BG
	Speciala priservado de nefacilmovaj personoj per fervoja transporto	Gregoriev, J. Trifonova, V.	BG
	Estradperfektigo de fervoja vartransporto	Rangelova, T., Petkov, P., Maneva, D. Pobomikova, R.	BG
	La muzeaj tradicioj en la bulgaraj fervojoj	Delanov, D.	BG
	Aliĝo de orienteŭropaj fervojoj al transeŭropaj koridoroj	Sredič. G.	YU
	Trajnveturado en la jaro 2100	Hartig, D.	DE
	Translima trafiko per EgroNet	Hoffmann, H.	DE
12	Kargotramoj en Dresden	Hoffmann, H.	DE
	La Danubaj pontoj en Rumanio	Teodorescu, D.	RO
	La kontribuo de fakuloj de la Instituto por Studado kaj Projektado de Fervojoj Bukareŝto (ISPCF) al la realigo de cifereca reto de la Rumanaj Fervojoj	Ionescu, C.	RO
	Nova projekto de la fervojlinio Praha-Kladno	Tomíšek, J.	CZ
	La strategio de la publika fervoja pasaĝertransporto en Rumanio	Tudorache, E. Giuhat, R.	RO
	Inundo 2002	Kovař, L.	CZ
	Enkonduko de integrita transporto en la transportsistemon de la ĉefurbo – Bukareŝto	Giuhat, R., Nedelcu, I.	RO

13	La modernigo de fervojaj teleregadaj sistemoj por realigo de la interkunlaborado en la traeŭropaj koridoroj	Buciomani, I.	RO
	Eksperta sistemo por kalkulado de la pozicio de difekto en elektroenergia instalaĵo	Saraciu, C., Golea, V.	RO
	Modernigo de fervojstacioj al eŭropaj normoj - "Eŭrostacidomoj"	Stanescu, T.	RO
	Skizo pri la evoluo de lokomotivoj ĉe la Rumanaj Fervojoj C.F.R.	Tudorache, E.	RO
	Magnetvojo en Ĉinio	Xueqin, S.	CN
	Historio pri grandaj rapidoj en Francio – la grandaj rekordoj	Ripoche, J.	FR
14	Protektado de ŝtalpontoj kontraŭ korodo	Teodorescu, D.	RO
	Stacidoma portiko fortrenita	Hofmann, H.	DE
	Malfermo de nova linio por rapidaj trajnoj al Oriento	Ripoche, J.	FR
	Modernigo de energi-provizaj instalaĵoj en elektro-centraloj	Golea, V.	RO
15	Ĉina fervojo hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ	Liu, C.	CN
	Ĉina fervojo sur la mondfirsto	Han, Z.	CN
	Historia skizo pri la rumantaj fervojoj ĝis 1990	Neagu, D.	RO
16	Komandosistemo por ekspluatado ERTMS	Lafosse, M.	FR
	Nuna situacio kaj perspektivo de ĉina elektrizita fervojo	Zhu, M	CN
	Trafika efikeco de fervojoj en Eŭropo kaj en la mondo	Hinš, Z.	HR
	La Azia-Eŭropa kontinenta ponto	Chen, D.	CN
	'La aŭstralia projekto' – forvendo de 23 Mz-lokomotivoj	Klitgaard, P., Niemann, J.	DK

17	Feria trajno por biciklistoj	van Leeuwen, W.	NL
	La pola Fervoja Ĉeflinio	Fortuński, J., Łęgowski, L.	PL
	La fervoja transporto en Pollando	Fortuński, J., Łęgowski, L.	PL
	La elektrizado de la Orienta Marborda Ĉef-fervojo	Burgess, A.	GB
	Ekonomia situacio en Polaj Ŝtataj Fervojoj – transportrezultoj atingitaj en la jaro 1991 kompare kun la jaro 1990	Fortuński, J.	PL
	Inĝ. Alois Negrelli, projektanto de fervojoj kaj de Sueza kanalo	Tomíšek, J.	CZ
	La komuna tera havo	Thaens, P.M.	FR
	Projekto de subtera fervojlinio Ĉeĥio – Adriatiko, ĉu scienca fikcio aŭ ebla realeco?	Tomíšek, J.	CZ
	Informadsistemoj por vojaĝantoj kun deficitata vidkapablo en fervojtrafiko de Ĉeĥio	Matuška, J., Kovář, L.	CZ
	Muzeoj pri ĉinaj vaporaj lokomotivoj	Song, J.	CN
18	Grandrapidaj trajnoj Sapsan trafikis en Rusio	Tomíšek, J., Hoffmann, H.	CZ, DE
	Nova tramvojo en kaj ĉe Aarhus	Niemann, J.	DK
	Fervojveturiloj por transportado de malfacilmovaj pasaĝeroj en la Ĉeĥa respubliko	Matuška, J., Zdeněk, P.	CZ, PL
	Diagnostiko de fervojaj sekurigaj sistemoj	Kovář, L.	CZ
	Tauern-fervojo	Stuppnig, M., Quietensky, E.	AT

19	Eŭropa adapto de la fervojo <i>Chişinău</i> (Kiŝinevo) – <i>laşi</i> per normala ŝpuro de 1435 mm	Giuhat, G., Tudorache, E.	RO
	Kiel aperis nomoj de la famkonataj trajnoj ?	Tomášek, J.	CZ
	Senbariera transporto – faka libro	Matuška, J.	CZ
	Rekonstruado kaj modernigado de la fervojlinio <i>Plovdiv – Svilengrad</i> ĉe la landlimo inter Turkio kaj Grekio	Maglov, A., Valev, T.	BG
	Trafikterminalo en Česká Třebová	Kovář, L.	CZ
	La kopenhaga metroo – ĉefe pri la subteraj konstruaĵoj	Niemann, J.	DK
20	Bündner Centralbahn-projekto aŭ 'povus esti aliel...'	Schultz, L., Niemann, L.	CH, DK
	Katara fervojo por futbalo	Tomášek, J.	CZ
	Energia efikeco de certaj eŭropaj fervojoj	Hinšt, Z.	HR
	Tra Arabia duoninsulo	Tomášek, J.	CZ
	La <i>Hallandsås</i> -projekto	Niemann, L.	DK
21	Sciindaĵoj pri Harcaj etŝpuraj fervojoj	Hoffmann, H.	DE
	Datrevenoj de elstaraj Esperantistoj en Kroatio en la jaro 2012	Hinšt, Z.	HR
	La dana entrepreno <i>Metro-Service</i> transiras limojn	Niemann, L.	DK
	Joachim Gießner	Retzlaff, M.	DE
	Rerigardo al foiro <i>InnoTrans</i> 2012	Tomášek, J.	CZ
	Universitato Pardubice – laboratorio kaj trafika salono	Matuška, J., Tomášek, J.	CZ
22	Prezentado de la tekniko APS de la tramvojo de <i>Bordeaux</i>	Lafosse, M.	FR
	La viadukto <i>Viaduc de Fades</i> – centjara majstroverko de inĝeniera arto	Combes, R.	FR
	Duonjarcento de instituto <i>VÚŽ Velim</i>	Tomášek, J.	CZ
	Alikonstruo de stacio <i>Ústí nad Orlicí</i>	Kovář, L.	CZ

23	Rerigardo al foiro <i>InnoTrans</i> 2014	Tomíšek, J.	CZ
	<i>InnoTrans</i> – unuafoja vizitanto	Niemann, L.	DK
	<i>InnoTrans</i> – temo ‘Tramoj’	Niemann, L.	DK
	<i>InnoTrans</i> – pripensaĵoj – informdirektado por surrela trafiko	Kovář, L., Hoffmann, H.	CZ, DE
	<i>InnoTrans</i> – mebloj en trajnoj	Niemann, L.	DK
	<i>InnoTrans</i> – bilet-papero	Niemann, L.	DK
	Radiofoniobloko	Frýbort, F., Kovář, L.	CZ
24	Fervoja konstruado en Junnano	Nan, L.	CN
	Vartrafiko en Eŭropo kaj Azio	Hakl, L., Matuška, J.	CZ
	Svisa fervojo	Rooke, D.	CH
	La freneza fervojo	Niemann, L.	DK
25	Evoluo de vojkvidaj transportsistemoj	Aleksandrova, P.	BG
	Transporto de danĝeraj varoj per fervojo	Trenne, M.	DE
	Diagnoziko de fervojvagonoj	Kovář, L.	CZ
	Fervoja kargo-transportado de Ĉinio	Zhang, H.	CN
	Akumulatora manovra traktoro	Brandenburg, G.	DE
	Stacidomoj pripentritaj	Tornillo, V.	IT
26	El historio fervojkunligo Ĉeĥoslovakio kaj Eŭropo	Matuška, J.	CZ
	San-administrado por fervojistoj	Mingda, X.	CN
	Resumo pri la stacidomo de Colmar	Hoffmann, H.	DE
	Ĉefa stacidomo en Zagrebo kiel fervoja centro en Kroatio	Hinšt, Z.	HR
	Nova fervoja relvoj-interligo Dresdeno-Prago	Kovář, L.	CZ

27	40 jaroj de rangostacio Zagreb – konstruado, graveco kaj perspektivo	Hinšt, Z.	HR
	Studo pri informa sistemo de internacia integriĝa logistik-administrado fare de Hohhota Fervoja Buroo, Interna Mongolio de Ĉinio	Zhang, H.	CN
	Informad- kaj orientiĝsistemo por blinduloj en Ĉeĥio	Matuška, J.	CZ
	“Ironlev” - sistemo de magneta ŝvebigo, projekto itala	Tornillo, V.	IT
	Nova silkvojo	Kovář, L.	CZ
	Modelo <i>Karlsruhe</i> – tramoj sur fervojaj trakoj	Brandenburg, G.	DE

Kelkaj personoj aktivaj por IFEF ...

Kompreneble estas vere multaj aktivuloj ĉe IFEF; por funkciigi federacion, por organizi kongresojn, por la faka laboro, por la bulteno ... necesas multaj homfortoj, kaj estas neeble nomi ĉiujn.

Jen, ĉar estas 'historia trarigardo', ni mencias kelkajn gravajn konatajn personojn, kiuj ne plu estas inter ni. Estas menciita ankaŭ la IF-numero kun la nekrologo. Kompreneble ankaŭ ĉi tie ĉiujn ni ne kapablas mencii. Estas multaj nun ne plu vivantaj aktivuloj en internacia kadro, sur kies ŝultroj IFEF nun staras.

Persono	Lando	Vivis	IF
G. Gimelli	Italio	1913 – 1999	2000/1
S. Chrdlová	Ĉeĥio	1954 – 2000	2000/2
J. Babička	Ĉeĥio	1908 – 2002	2002/6
J. Giessner	Germanio	1913 – 2003	2004/1
H. Hauge	Danio	1935 – 2003	2003/5
W. v. Leeuwen	Nederlando	1918 – 2004	2004/5
H. Bengtsson	Svedio	1914 – 2005	2006/1
L. Sekereš	Serbio	1927 – 2007	2008/1
F. Tschomm	Aŭstrio	1925 – 2007	2008/1
H. Happi-Fosso	Francio	1942 – 2008	2008/3
P. J. Krogstie	Norvegio	1929 – 2009	2010/1
M. Balogh	Hungario	1943 – 2010	2010/4-5
J. Poptie	Nederlando	1923 – 2011	2011/3
G. Sredič	Serbio	1935 – 2011	2011/6
J. Pištora	Ĉeĥio	1931 – 2011	2012/1

E. Enev	Bulgario	1944 – 2012	2013/2
Y. Hiltunen	Finnlando	1912 – 2012	2012/5
E. H. Olsen	Danio	1930 – 2012	2013/1
O. Rösemann	Germanio	1923 – 2012	2012/4
R. Ruiz	Hispanio	1927 – 2012	2012/5
H. Schindler	Germanio	1920 – 2012	2012/6
J. Cziboly	Hungario	1936 – 2013	2013/4
W. Barnickel	Germanio	1921 – 2014	2015/1
G. Eggenberger	Svisio	1925 – 2014	2014/3
P. Engen	Norvegio	1924 – 2014	2014/4
H. D Hartig	Germanio	1928 – 2014	2015/1
F. Strumínský	Ĉeĥio	1922 – 2014	2015/3
E. Glättli	Svisio	1924 – 2015	2015/5
J. Patay	Hungario	1929 – 2015	2015/2
T. Kapista	Serbio	1930 – 2016	2016/4
E. Kruse	Germanio	1914 – 2016	2016/3